3.ª Epoko * N.º 91 Decembro * 1924

# LA SUNO HISPANA

Organo de la hispanaj esperantistoj * Organo de los esperantistas españoles

Fondinto: AUGUSTO JIMENEZ LOIRA

Redakcio: Mar, 23 = VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

Direktoro: M. CAPLLIURE

ENHAVO: Novjara saluto.—Unua Kongreso de la Internacia Jura Komitato de Radio.—Unua Kongreso de la Internacia Unio de Radio-Amatoroj.—Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj.—Por nia IIª Kongreso de la «Federación Esperantista» en Liria.—Universala Esperanto-Asocio.—Gramatikajoj.

La Direktoro kaj Redaktoraro de LA SUNO HISPANA deziras al la legantoj gajan kristnaskon kaj feliĉan novjaron 1925ª

El Director y Redactores de LA SUNO HISPANA desean a los lectores alegres Pascuas de Navidad y feliz año nuevo 1925

52972
0552
5218
59
524

# Novjara saluto

La paco sur la tero nur estas mito:
ĉie la mondon premas grandaj doloroj,
ĉie resonas enoj de la milito:
mortoj, brulegoj, pafoj, vundoj kaj ploroj.
La homoj sian vivon pasas per kantoj
kaj forgesas la sangon de la vunditoj,
la kriojn gajecplenajn de la venkantoj
kaj la plorantajn kriojn de la venkitoj.

Nure, super kruelaj homaj doloroj,
brilas inter la nuboj, la Verda Stelo,
ĝi volas unuigi korojn kun koroj
kaj la mondon klarigi per ĝia helo.

Inter homaj bataloj, estas perdita
tia voĉeto kiun oni forpelas,
ĉar al mondo freneza, fumo milita
nun plenkovrigas tion, kion ni celas.

Sed ĝia lumo estis ne senutila
inter miloj vokitaj, kelkajn ĝi trovis:
la Steleto lumigas per lumo brila
ĉar se multaj ĝin neis, kelkaj sin movis.

. . . . . . . . . . . . . . . .

Jam post la nigra nokto, la lum' aperas,
permesu ke tra limoj, lingvoj kaj rasoj
frate sin amu tiuj, kiuj esperas,
ni, hodiaŭ, polvero; morgaŭ, amasoj.
Ke trovu feliĉecon tuta homaro
dum la venonta jaro, la dudekvina,
saluton al tutmonda amgefrataro,
kaj al ĉiuj la landoj, paco senfina.

A. N. D.

# UNUA KONGRESO

Primer Congreso

## de la Internacia Jura Komitato de Radio

del Comité Jurídico Internacional de T. S. H.

# UNUA KONGRESO

Primer Congreso

## de la Internacia Unio de Radio-Amatoroj

de la Unión Internacional de los aficionados a la T. S. H

**Secretarioj: 2, rue de l'Echaudé-Saint-Germain, Paris (6^e^)**

Secretaria: 2, rue de l'Échaudé — St — Germain, París (6e)

**(TELEFONO: GOBELINS 64-42)**

(Teléfono: Gobelins 64-42)

**PARIZO, Pasko 1925 (16-20. Aprilo)**

París, Pascua de 1925 (16-20 abril)

La pli kaj pli granda nombro da radiotelefonaj sendoj, la plimultiĝo de radiotelegrafaj rilatoj inter amatoroj kaj la mirinda rapideco de la progresoj en la radio-fako de scienco kaj tekniko antaŭvidigas por tre baldaŭa estonteco tute novan staton de la interpopolaj rilatoj super la landlimoj kaj per tio starigas gravajn problemojn internaciajn.

Ĉiu partoprenanto en tiu mirinda movado certe pensis pri ĝiaj eventualaj sekvoj. Senteble estas, ke metoda kunordigo de la penadoj, organizo de la nunaj rilatoj, hodiaŭ dezirinda, tre baldaŭ fariĝos necesa.

En la pasinta monato Marto S-ro Hiram Percy Maxim, prezidanto de la *American Radio Relay League*, pasigis kelkajn tagojn en Francujo. La Intersocieta Komitato, konsistanta el delegitoj de la plej malnovaj francaj radio-asocioj, plezure uzis la okazon de lia ĉeesto, por esplori kun li, en kia maniero la tutmondaj amatoroj povus plifortigi la ligilojn, kiuj unuigas ilin, kaj utile labori por la necesa organizado.

La sekvanta protokolo estis redaktita:
«Radio-amatoroj el Belgujo, Hispa-»nujo, Usono, Francujo, Britujo, Luk-»semburga Duklando, Italujo kaj Svisu-»jo, kunvenintaj aŭ reprezentataj en Pa-

La generalización de las emisiones radiotelefónicas, la extensión de las relaciones radiotelegráficas entre los aficionados a la T. S. H. y la asombrosa rapidez de los progresos en esta rama de la ciencia y de la técnica, dejan entrever para un porvenir muy próximo, una situación completamente nueva en las relaciones entre los pueblos por encima de las fronteras, y, por ende, crea graves problemas internacionales.

Todo aquel que toma parte en este movimiento extraordinario, habrá pensado ciertamente en sus probables consecuencias. Se nota, en efecto, que una coordinación metódica de los esfuerzos, una organización de las actuales relaciones, hoy deseable, vendrá a ser pronto necesaria.

En marzo último, M. Hiram Percy Maxim, presidente de la *American Radio Relay League*, pasó algunos días en Francia. El Comité Intersocietario, formado por delegados de las más antiguas sociedades francesas de T. S. H., aprovechó gustoso la ocasión de su estancia, para conferenciar con él, sobre el modo de estrechar los lazos que unen a los aficionados de todo el mundo y trabajar eficazmente en pro de la necesaria organización.

Fué redactada la siguiente acta:
«Varios aficionados a la T. S. H. de »Bélgica, España, Estados Unidos, Fran-»cia, Gran Bretaña, Ducado de Luxem-»burgo, Italia y Suiza, reunidos o repre-

»rizo, la 12-an de marto 1924, por studi »kun S-ro Hiram P. Maxim, prezidanto »de la *American Radio Relay League*, la »dezirindecon de internacia organizo de »amatora Radio, unuanime konsentis pri »tiu dezirindeco.

»Sub kondiĉo de posta aprobo por »tiuj el ili, kiuj ne estis por tio komisiitaj »de siaj naciaj societoj, ili elektis, por »studi, kiamaniere efektivigi tian organi- »zon:

»Por Belgujo: S-ron Henrotay;
»Por Hispanujo: S-ron Balta Elias;
»Por Usono: S-ron Hiram P. Maxim;
»Por Francujo: D-ron P. Corret;
»Por Britujo: S-ron G. Marcuse;
»Por Luksemburga Duklando: S-ron »De Groot;
»Por Italujo: S-ron Giulio Salom;
»Por Svisujo: S-ron Cauderay.

»Danujo, kiu ne povis sendi repre- »zentanton, estis ple informota de D-ro »Corret pri la aranĝoj faritaj kun S-ro Maxim (1).

»La tiel elektitaj amatoroj, aŭ iliaj re- »prezentatoj, kunvenis la 14-an de Marto, »krom S-ro G. Marcuse, kiu ne povis pli »longe daŭrigi sian restadon en Parizo.

»La komitato tiel starigita alprenis la »nomon Provizora Komitato por la orga- »nizo de Internacia Unio de Radio-Ama- »toroj kaj elektis S-ron H. P. Maxim kiel »prezidanton kaj D-ron Corret kiel sekre- »tarion.

»Ĝia opinio estis, ke, post antaŭa studo »de projekto starigita de la A. R. R. L., la »definitiva fondo de internacia anaro de »radio-amatoroj estu proponata al la dis- »cuto de internacia kongreso, kunveni- »gota en Parizo dum la Paska libertempo »1925. La nomo Internacia Unio de Radio- »Amatoroj ŝajnis al ĝi la plej taŭge elek- »tebla por tiu anaro.

(1) Delegito de Ĉeĥoslovakujo estis poste akceptita.

»sentados en París, el 12 de marzo de 1924, »para estudiar con M. Hiram P. Maxim, »presidente de la *American Radio Relay* »*League*, la conveniencia de una organi- »zación internacional de los aficionados a »la T. S. H., se muestran absolutamente »conformes en acordar tal conveniencia.

»A condición de ulterior aprobación, »respecto a algunos de ellos, que carecie- »ran de la correspondiente autorización »de sus sociedades nacionales, fueron ele- »gidos, para estudiar la manera de reali- »zar semejante organización, los siguien- »tes:

»Por Bélgica: M. Henrotay;
»Por España: Sr. Balta Elías;
»Por Estados Unidos: M. Hiram P. »Maxim;
»Por Francia: Dr. P. Corret;
»Por Gran Bretaña: M. G. Marcuse;
»Por Luxemburgo: M. de Groot;
»Por Italia: Sr. Giulio Salom;
»Por Suiza: M. Cauderay.

»Dinamarca, que no pudo enviar representante, había de ser informada por el Dr. Corret de los acuerdos tomados con M. Maxim (1).

»Los aficionados así elegidos, o sus »representantes, se reunieron el 14 de »marzo, excepto el Sr. G. Marcuse, que »no pudo prolongar su permanencia en »París.

»El comité así formado tomó el nom- »bre de Comité Provisional para la orga- »nización de la Unión Internacional de »aficionados a la T. S. H. y eligió al se- »ñor H. P. Maxim como presidente y al »Dr. Corret como secretario.

»Su opinión es que, previo estudio de »un proyecto presentado por la A. R. R. L., »la fundación definitiva de una agru- »pación internacional de aficionados a la »T. S. H., sea puesta a discusión del con- »greso internacional, que ha de celebrar- »se en París durante las vacaciones de »Pascua de 1925. El nombre de Unión In-

(1) El Delegado de Checoeslovaquia fué admitido posteriormente.

»La diversaj naciaj societoj de radio-»amatoroj estus invitataj provizi garan-»tian kapitalon, por ebligi la preparajn »elspezojn de la kongreso. La mono dis-»poneblígita de la societoj estus poste re-»pagata al ili aŭ tute, aŭ, se okazus defi-»cita, proporcie laŭ ilia disponebligo».

Konforme al la supra protokolo la asocioj de Radio-Amatoroj en Francujo prizongis la organizon de la unua kongreso, kiu definitive starigos la Internacian Union de Radio-Amatoroj, kaj dum kiu estos esplorataj la diversaj demandoj internacie interesaj.

Aliflanke, la pli kaj pli granda rolo, kiun ludas nun radiotelefonio kaj radiotelegrafio en la ekonomia, politika kaj arta movado de la nacioj, naskis multajn jurajn problemojn. Novaj rilatoj kreiĝis pro Radio inter la Ŝtatoj kaj inter la diversaj kategorioj da koncernatoj, nome: registaroj, ekspluatantoj de sendaj stacioj, aŭtoroj, ludantaj artistoj, amatoroj kaj uzantoj. La reguloj aplikeblaj al la juraj okazoj konstatitaj en la praktiko estas difineblaj interne de ĉiu Ŝtato. Sed la naciaj leĝoj, kiuj regas Radion, necese devas esti kompletigitaj per internacia regularo.

En la jaro 1923 fondiĝis en Parizo Asocio nomata «Internacia Komitato de Radio», por prilabori la internacian regularon de Radio. La komitato konsistas nun el membroj apartenantaj al la sekvantaj Ŝtatoj: Arĝentina Respubliko, Aŭstrujo, Belgujo, Kanado, Kolombio, Kubo, Danujo, Egiptujo, Hispanujo, Usono, Francujo, Granda Britujo, Haitio, Hungarujo, Italujo, Japanujo, Luksemburgo, Monako, Norvegujo, Nederlando, Polujo, Portugalujo, Dominga Respubliko, Siamo, Svedujo, Svisujo, Ĉehoslovakujo. La

»ternacional de aficionados a la T. S. H., »pareció el más a propósito para tal agru-»pación.

»Las diversas sociedades nacionales de »aficionados a la T. S. H., quedan invita-»das a constituir un capital de garantía, »para subvenir a los gastos de prepara-»ción del congreso. El dinero anticipado »por las sociedades les sería luego reinte-»grado, totalmente o, si hubiera déficit, »proporcionalmente a su anticipo».

De conformidad con el acta que precede, las asociaciones de aficionados a la T. S. H., de Francia, han empezado la organización del primer congreso, que definitivamente ha de fundar la Unión Internacional de aficionados a la T. S. H., durante el cual serán examinados los diversos asuntos de interés internacional.

Por otra parte, el papel cada vez más importante que desempeñan actualmente la radiotelefonía y la radiotelegrafía en el movimiento económico, político y artístico de las naciones, ha engendrado multitud de problemas jurídicos. Nuevas relaciones se han creado a causa de la Radio entre los Estados y entre las diversas categorías de interesados, a saber: gobiernos, explotadores de estaciones emisoras, autores, artistas, ejecutantes, aficionados y todos cuantos usen este medio de comunicación. Las reglas aplicables a los casos jurídicos presentados en la práctica pueden definirse dentro de cada Estado. Pero las leyes nacionales que rigen la T. S. H. deben ser necesariamente completadas por un reglamento internacional.

En el año 1923 se fundó en París una Asociación llamada «Comité Internacional de T. S. H.» para confeccionar el reglamento internacional de Radio. El comité se compone de miembros pertenecientes a los siguientes Estados: República Argentina, Austria, Bélgica, Canadá, Colombia, Cuba, Dinamarca, Egipto, España, Estados Unidos, Francia, Gran Bretaña, Haití, Hungría, Italia, Japón, Luxemburgo, Mónaco, Noruega, Holanda, Polonia, Portugal, República Dominicana, Siam, Suecia, Suiza, Checoeslovaquia. El

Komitato interrilatas kun la Ligo de Nacioj kaj kun tiaj Federacioj kaj Asocioj: Unio de Internaciaj Asocioj, Internacia Komerca Ĉambro, Internacia Leĝa Asocio, Societo por Leĝaj Studoj, Konfederacio de Intelektaj Laborantoj, Societo de Literaturistoj, Internacia Literatura kaj Arta Asocio, Sindikata Ĉambro de Muzikaj Artistoj, Profesiaj Sindikatoj de Radio-Elektraj Industrioj en la diversaj landoj, k. t. p.

Por studo de la juraj problemoj starigataj de la aplikoj de radioelektro, la Internacia Komitato de Riadio organizas unuan internacian Kongreson, kiu ankaŭ kunvenos en Parizo dum la jaro 1925.

Pro la granda nombro da komunaj punktoj renkonteblaj en la demandoj, kiuj prezentiĝas al la juristoj, teknikistoj, amatoroj kaj uzantoj de Radio, la organizantoj ekopiniis, ke plej bone estos okazigi samtempe la Internacian Kongreson de Radio-Amatoroj kaj la Internacian Juran Kongreson de Radio. Kun tiu celo estis starigita en Parizo organiza Komitato kun unu sola Sekretariejo, por organizi ambaŭ Kongresojn laŭ sama ĝenerala plano, kun akordiĝantaj programoj, sub sama patronaro kaj je la sama dato kvankam ambaŭ kongresoj konservos sian propran memstarecon.

Ambaŭ Kongresoj okazos en Parizo de la Paska Ĵaŭdo, 16. Aprilo ĝis la posta Lundo, 20. Aprilo 1925.

Ĉiuj Juristoj kaj Amatoroj estos akceptataj en tiujn Kongresojn, sed rajtos voĉdoni en la Jura Kongreso nur la membroj de la Internacia Komitato de Radio, kaj en la Amatora Kongreso nur la oficialaj delegitoj de naciaj Radio-Societoj.

La Organiza Komitato zorgas pri kolektado de la necesa monsumo por preparo de la Kongresoj; ĝi lasas ĉiun So-

Comité se comunica con la Sociedad de las Naciones y con las siguientes Federaciones y Asociaciones: Unión de Asociaciones Internacionales, Cámara Internacional de Comercio, Asociación Internacional Legislativa, Sociedad de Estudios Legislativos, Confederación de Trabajadores Intelectuales, Sociedad de Literatos, Asociación Internacional Literaria y Artística, Cámara Sindicada de Artistas Músicos, Sindicatos Profesionales de Industrias Radio-Eléctricas en los distintos países, etc.

Para el estudio de los problemas jurídicos creados por las aplicaciones de la radioelectricidad, el Comité Internacional de T. S. H., organiza el primer Congreso internacional, que también tendrá lugar en París durante el año 1925.

A causa del gran número de puntos comunes evidenciados en las cuestiones que se presentan a los juristas, técnicos, aficionados y personas que hacen uso de la T. S. H., los organizadores han creído que lo mejor será celebrar al mismo tiempo el Congreso Internacional de aficionados a la T. S. H., y el Congreso Jurídico Internacional de T. S. H. Con este fin se ha constituído en París un Comité organizador con una sola Secretaría, para organizar ambos Congresos con arreglo a un mismo plan general, con programas combinados, bajo el mismo patronato y en la misma fecha, aunque ambos congresos conserven su propia individualidad.

Los dos Congresos se celebrarán en París desde el jueves de Pascua, 16 de abril, hasta el lunes siguiente, 20 de abril de 1925.

Todos los Juristas y Aficionados serán aceptados en estos Congresos, pero sólo tendrán derecho a votar: en el Congreso Jurídico, los miembros del Comité Internacional de T. S. H., y en el Congreso de Aficionados, los delegados oficiales de las Sociedades nacionales de T. S. H.

El Comité Organizador cuida de reunir la cantidad de dinero necesaria para la preparación de los Congresos, dejando

cieton libera decidi, en kia grado ĝi povos partopreni en la elspezoj.

La programoj de la Kongresoj estos, kiom eble, aranĝitaj en tia maniero, ke la partoprenantoj en unu el la Kongresoj povos ĉeestis la kunsidojn de la alia kaj ankaŭ partopreni en la akceptoj kaj diversaj kongresaj okazoj.

La kosto de la kongresa karto estas minimume 25 frankoj por la Kongreso de la Internacia Unio de Radio-Amatoroj aŭ por tiu de la Internacia Jura Komitato de Radio, kaj 40 frankoj por partopreno en ambaŭ Kongresoj.

La kotizaĵon, kalkulitan laŭ francaj frankoj, oni sendu kiel eble plej baldaŭ, samtempe kun kongresa aliĝo, al la ĝenerala sekretariejo de la Kongresoj, 2, rue de l'Échaudé-Saint-Germain, Paris (6e).

## PROVIZORA TAGORDO

### DE LA INTERNACIA JURA KONGRESO DE RADIO

I.—Jura regularo de la ondoj. Rajtoj de la sendanto kaj de la ricevanto Ŝtata kontrolo.

II.—Internacia regularo de la sendoj.

III.—Intelekta propraĵo kaj radiotelefonaj sendoj. Rajtoj de aŭtoro. Interesoj de la ludantaj artistoj. Propreco de gazetaj informoj Reklamado.

### DE LA KONGRESO DE LA INTERNACIA UNIO DE RADIO-AMATOROJ

I.—Organizo de Internacia Unio de Radio-Amatoroj.

II.—Metoda organizo de la teknikaj provoj de amatoroj.

libre a cada Sociedad para que acuerde la cuantía de su participación en los gastos.

Los programas de los Congresos serán, en tanto cuanto sea posible, dispuestos de tal modo, que los que hayan de tomar parte en uno de ellos, puedan también asistir a las sesiones del otro y participar de las invitaciones y diversos actos de ambos.

El coste mínimo de la tarjeta de congresista es de 25 francos para el Congreso de la Unión Internacional de Aficionados a la T. S. H., o para el del Comité Jurídico Internacional de T. S. H., y 40 francos para tomar parte en ambos Congresos.

La cuota, calculada en francos franceses, envíese cuanto antes, al propio tiempo que la adhesión de congresista, a la Secretaría general de los Congresos, *2, rue de l'Echaudé Saint-Germain*, París (6e).

## ORDEN DEL DÍA PROVISIONAL

### DEL CONGRESO JURÍDICO INTERNACIONAL DE T. S. H.

I.—Reglamento jurídico de las ondas. Derechos del transmisor y del receptor. Intervención del Estado.

II.—Reglamento internacional de las emisiones.

III.—Derecho de propiedad intelectual y emisiones radiotelefónicas. Derecho de autor. Intereses de los artistas ejecutantes. Propiedad de las informaciones periodísticas. Anuncios.

### DEL CONGRESO DE LA UNIÓN INTERNACIONAL DE AFICIONADOS A LA T. S. H.

I.—Organización de la Unión Internacional de Aficionados a la T. S. H.

II.—Organización metódica de las pruebas técnicas de los aficionados.

III.—Ondolongoj de radiotelefonio kaj de la amatoraj sendoj.

IV.—Eduka uzado de radiotelefonio.

V.—Helpa lingvo internacia.

Ni petas, ke vi bonvolu komuniki tiujn tagordojn al la membroj de via Societo aŭ de viaj filiaj grupoj. Aliflanke, ni estus al vi dankaj, se vi jam nun studus ilin kaj sendus al ni, *antaŭ la 31. Decembro venonta*, ĉiajn rimarkojn aŭ sugestojn pri eventualaj aldonoj aŭ precizigoj. Por plifaciligi la laboron kaj eviti malfacilaĵojn, kiuj devenus de tro granda diverseco en la esprimotaj opinioj, la Komitato petas, ke vi mem bonvolu kolekti la opiniojn de viaj societanoj kaj sendi al ni pri ili vian raporton. Atentinde ja estas, ke, por efektivigi utilan laboron, la pritraktotaj demandoj estu nur malmultaj.

Koncerne la studon de la demandoj enskribitaj en la tagordo, raportoj estos verkitaj de kongresanoj, kiuj interesiĝas pri tiuj temoj. Ni petas, ke vi bonvolu kolekti tiujn raportojn kaj sendi ilin al ni, kun ĝenerala esprimo de via opinio, kiel eble plej baldaŭ kaj *plej malfrue la 1 Februaro 1925*, por ke la specialaj komisionoj disponu sufiĉan tempon, por studi ilin kaj por prepari la kunsidojn de la Kongresoj.

Bonvolu sendi ĉiuj viajn komunikaĵojn laŭ la jena adreso:

*Monsieur le Secrétaire général du Congrès de T. S. F., 2, rue de l'Échaudé-Saint-Germain, Paris* (6e).

En la supra maldekstra angulo de viaj kovertoj skribu: «CONGRÈS DES AMATEURS» aŭ «CONGRÈS JURIDIQUE» laŭ tio, se via korespondaĵo rilatas unu aŭ la alian el tiuj Kongresoj.

III.—Longitudes de onda en radiotelefonía y de las emisiones de aficionado.

IV.—Utilización educativa de la radiotelefonía.

V.—Lengua internacional auxiliar.

Rogamos a usted que tenga la bondad de comunicar estos órdenes del día a los miembros de su Sociedad o de los grupos filiales. Además, agradeceríamos a usted, que desde luego las estudiaran y nos enviaran, *antes del 31 de diciembre próximo*, cuantas observaciones o indicaciones crean convenientes en el sentido de añadir o modificar su contenido. Para allanar la labor y evitar dificultades, que sobrevendrían por causa de la diversidad de opiniones a manifestar, el Comité ruega que usted mismo se sirva recoger las opiniones de sus asociados y nos envíe su resumen. Es digno de notarse, que para realizar un trabajo útil, las cuestiones a tratar deben ser en el menor número posible.

En cuanto al estudio de las cuestiones consignadas en el orden del día, los congresistas a quienes interesen tales temas deberán presentar las correspondientes memorias. Y le rogamos encarecidamente recoja usted estas memorias y las haga llegar hasta nosotros, con su opinión general sobre ellas, lo antes posible, y *a más tardar el 1.º de febrero de 1925*, para que las comisiones especiales tengan tiempo suficiente para estudiarlas y preparar las sesiones de los Congresos.

Sírvase dirigir todas sus comunicaciones a la siguiente dirección:

*M. le Secrétaire général du Congrès de T. S. F., 2, rue de l'Echaudé-Saint-Germain, Paris* (6e).

En el ángulo superior izquierdo de los sobres escríbase: «CONGRÈS DES AMATEURS» o «CONGRÈS JURIDIQUE», según que la correspondencia se refiera a uno o al otro de los Congresos.

Ni petas vin akcepti la esprimon de nia plej alta estimo.

*La Prezidanto*
*de la Franca Radio-Klubo:*
EDOUARD BELIN.

*La Prezidanto*
*de la Franca Societo por Studo de Radio:*
DR. FRANCHETTE.

*La Prezidanto*
*de la Societo de Amikoj de Radio:*
R. DE VALBREUZE.

*La Prezidanto*
*de la Internacia Jura Komitato de Radio:*
AMBROISE COLIN,
Konsilanto ĉe la Kasacia Kortumo.

Rogamos acepte usted la expresión de nuestra más alta consideración.

*El Presidente*
*del Radio-Club de Francia,*
EDOUARD BELIN.

*El Presidente*
*de la Sociedad Francesa para Estudios de T. S. H.,*
DR. FRANCHETTE.

*El Presidente*
*de la Sociedad de Amigos de la T. S. H.,*
R. DE VALBREUZE.

*El Presidente*
*del Comité Jurídico Internacional de T. S. H.,*
AMBROISE COLIN,
Consejero del Tribunal de Casación.

---

# ESPERANTO ĉe la Ligo de Nacioj

La kvina ĝenerala kunsido de la Ligo de Nacioj alprenis la 21an septembro la jenan rezolucion unuanime:

«La ĝenerala kunsido de la Ligo de Nacioj rekomendas ke la ŝtatoj membroj de la Ligo, konsentu al *Esperanto* la traktadon kaj tarifojn de lingvo *klara* en telegrafaj kaj radio-telegrafaj interrilatoj, *kiel praktika helpa lingvo de la internaciaj interkomunikoj flanke de la naciaj lingvoj uzataj*, kaj atentigas je tiu celo la Organizon pri Komunikado kaj Transito».

---

La tuta afero estis longe kaj eĉ iom pasie diskutata ĉe la dua komisiono, kie ni prezentis la proponon kun subteno de la delegitoj nederlanda, ĉina, japana kaj australia. Tiun-ĉi fojon la franca delegito

# EL ESPERANTO en la Liga de Naciones

En la quinta sesión del Pleno celebrada el día 21 de septiembre último, la Liga de Naciones adoptó por unanimidad la siguiente resolución:

«La Junta General de la Liga de las Naciones recomienda que todos los estados miembros de la misma, concedan al *Esperanto* el trato y tarifas de lengua *clara* en las relaciones telegráficas y radiotelegráficas, *como lengua práctica auxiliar de las comunicaciones internacionales, en compañía de las lenguas nacionales usadas*, y llama la atención sobre este particular a la Organización sobre Comunicación y Tránsito».

---

El asunto ha sido tratado en su totalidad por la segunda comisión, larga y hasta algo apasionadamente. La proposición fué presentada y apoyada por los delegados holandés, chino, japonés y aus-

sin detenis de ĉiu interveno au voĉdono. La brita, brazila kaj jujoslava deziris resendi la tutan aferon al alia komisiono por denova ekzameno. Unu sudamerika delegito proponis forigi la vortojn substrekatajn en la teksto ĉi-supre kaj anstataŭi *Esperanto* per *artefaritaj lingvoj*.

La pola raportanto memorigis pri la opinio de la Komisiono de intelekta Kunlaborado.

Malgraŭ tiu opino la ĉi-supra teksto estis fine akceptata de la dua komisiono per dek kvar voĉoj kontraŭ nau, kaj poste de la ĝenerala, kunsido unuanime. Voĉdonis por ĝi en la Komisiono, la delegitoj: Austria, Australia, Bulgara, Ĉina, Finlanda, Hungara, Itala, Japana, Nederlanda, Norvega, Nov-Zelanda, Persa, Rumana, Ĉenoslovaka. Al ili koran dankon.

Eble multaj esperantistoj miros kial ni ligis esperanton kun telegrafa afero. La kaŭzo estas tre simpla. Demandoj pri lernejoj ne staris sur la tagordo, dum telegrafaj estis. Plie, la decido enhavas elementon pli pozitivan ol simpla deziresprimo pri lernejoj. Ĝi entenas du punktojn:

La unua estas la praktika gajno, dezirita de la Venezia Konferenco, ke Esperanto ne estu plu konsiderata ĉe poŝtoficejoj kiel nura kodo cifera kaj de nun pagu la ordinaran tarifon de lingvo *klara* (do ordinara, ne cifera).

La dua estas la oficiala rekono kaj titoligo de Esperanto «kiel praktika helpa lingvo de la internaciaj interkomunikoj flanke de la naciaj lingvoj uzataj».

La franca teksto eĉ diras: *titre de langue auxiliaire*, k. t. p. Kiel prave konstatis ĝin poste D-ro Nitobe, ĝenerala vicsekretario de la Ligo, tio nun donas al Esperanto oficialan statutecon:

traliano. Esta vez el delegado francés se abstuvo de intervenir y de votar. Los delegados británico, brasileño y yugoslavo, propusieron se remitiera todo el asunto nuevamente a otra comisión para nuevo examen. Un delegado sudamericano propuso se eliminaran las palabras subrayadas del texto anterior y que fuera sustituído *Esperanto* por *lengua artificial*.

El delegado polaco manifestó se tuviera en cuenta la opinión de la Comisión de Colaboración Intelectual.

A pesar de todo, el texto transcrito fué en definitiva aceptado por la segunda comisión por 14 votos contra 9 y después aprobado en la sesión del pleno, por unanimidad. En la Comisión votaron en pro los delegados de Austria, Australia, Bulgaria, China, Finlandia, Hungría, Italia, Japón, Holanda, Noruega, Nueva-Zelanda, Persia, Rumania y Checoslovaquia. Para ellos nuestro cordial agradecimiento.

Es posible que muchos esperantistas se extrañen de por qué hemos mezclado el esperanto con un asunto telegráfico. La causa es sencilla. Las cuestiones relativas a escuelas no encabezaban el orden del día, al paso que las relativas a telégrafos, sí. Además, el acuerdo contiene un elemento más positivo que la simple expresión de un deseo acerca de las escuelas. Encierra dos puntos:

El primero constituye la conquista práctica, deseada por la Conferencia de Venecia, de que el Esperanto no sea considerado ya más por las oficinas de Correos como un simple código cifrado, y que, desde luego, pague la tarifa ordinaria de lenguaje *claro* (ordinario, no cifrado).

El segundo viene a ser el reconocimiento oficial y titulación del Esperanto «como lengua práctica auxiliar de las intercomunicaciones internacionales al lado de las lenguas nacionales usadas».

El texto francés hasta llega a decir: *titre de langue auxiliaire*, etc. Como con razón hizo constar el Dr. Nitobe, vicesecretario general de la Liga, ello da ahora al Esperanto una oficialidad estatutaria.

Neniu rajtos de nun nomi ĝin ĵargono: Ĝi estas oficiale rekonata homa lingvo, flanke de la naciaj lingvoj, kun preciza titolo, kiu esprimas laŭvorte la rolon al ĝi dediĉitan de D-ro Zamenhof.

Similan rekonon Esperanto jam ricevis de apartaj registaroj, sed neniam ĝis nun de interŝtata institucio. Pro tio ja ĵusa decido de la L. de N. signas tre gravan paŝon en la historio de Zamenhof: ĝi estus gajiginta la koron de nia Majstro.

Nadie tendrá derecho, desde este momento, a llamarle jerigonza. El está oficialmente reconocido como lenguaje humano, al lado de las lenguas nacionales, con el título exacto que expresa literalmente el papel que le adjudicó el Dr. Zamenhof.

Reconocimiento semejante ya recibió el Esperanto de distintos Gobiernos, pero nunca como hoy de un instituto internacional. Por ello, el acuerdo reciente de la L. d. N. señala un paso importante en la historia de Zamenhof: él hubiese llenado de gozo el corazón de nuestro Maestro.

## Por nia IIª Kongreso

### de la «Federación Esperantista Levantina» en Liria

Jen estas la plaĉaj sciigoj, kiujn ni ricevis el la dirita urbo, kie niaj kompetentaj kaj aktivaj samideanoj, doktoroj Serra kaj Fombuena, organizantoj de la proksima IIª Kongreso de la *Federación Esperantista Levantina*, efektivigas tiel laŭdindan kaj aplaŭdindan laboron:

«Plenan triumfon; la Urbestraro decidis, ĉe la kunsido de la lasta lundo, instali elektran lumon en la salono de la Lernejo por infanoj, por la kurso de Esperanto, kaj aĉeti la necesajn librojn por la malriĉaj infanoj, decido apogita de la Registara Delegito, S-ro. Jozefo Fornies, kaj de la Urbestro, S-ro. Mauricio Marques.

La naciaj profesoroj partoprenas en tiu movado, kaj tiucele ili ĉeestos la Esperantan kurson starigatan de S-ro. Fran-

## Para nuestro II Congreso

### de la Federación Esperantista Levantina en Liria

He aquí las gratas noticias que recibimos de dicha ciudad, donde nuestros competentes y activos *samideanos*, los Dres. Serra y Fombuena, organizadores del próximo II Congreso de la Federación Esperantista Levantina, realizan una labor tan laudable y plausible:

«Triunfo completo; el Ayuntamiento acordó, en la sesión del lunes último, instalar luz eléctrica en el local de la Escuela de párvulos, para las clases de Esperanto, y comprar los libros necesarios para los niños pobres, acuerdo apoyado por el señor Delegado gubernativo, don José Fornies, y el Alcalde D. Mauricio Marqués.

Los maestros nacionales secundan el movimiento, y al efecto, concurrirán al curso de Esperanto, que inaugurará don

cisko Fombuena, kiu estas honorata per la ĉeesto de la naciprofesoroj S-inoj. Amparo Escrig, Resurekcio Alcocer, S-roj. Martin Gracia, Jozefo Oriola kaj la Direktoro de supera instruado ĉe la Kolegio Sankta Mikaelo, S-ro. Aŭgusto Roca, kelkaj pastroj, advokatoj, k. c. Por pli da sesdek infanoj de ĉiuj aĝoj estas malferminta kurson S-ro. Johano Serra.

Ankaŭ malfermis kurson la Monaĥinoj de Sankta Ana, por fraŭlinoj».

Nian dankemecon al S-roj. Delegito kaj Urbestro kun lia Konsilantaro, al la naciaj profesoroj, kaj ankaŭ al la profesoroj de la Kolegioj Sankta Mikaelo kaj Sankta Ana.

¡¡Vivu Esperanto!!

Francisco Fombuena, que se ve honrado con la asistencia de los maestros D.ª Amparo Escrig, D.ª Resurrección Alcocer, D. Martín Gracia, D. José Oriola, maestros nacionales, y D. Agustín Roca, Director de Enseñanza superior del Colegio San Miguel, sacerdotes, abogados, etcétera, etc. Para más de sesenta niños de todas edades, ha habierto un curso don Juan Serra.

También han abierto curso las Hermanas de Santa Ana, para señoritas».

Nuestra gratitud a los señores Delegados y Alcalde con su Ayuntamiento, a los maestros nacionales, sin olvidar a los profesores de los Colegios de San Miguel y Santa Ana.

¡¡Viva Esperanto!!

---

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo: 12, Boulevard du Théâtre, Genève (Svislando)

*Universala Esperanto-Asocio* celas:

Disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto.

Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo.

Krei internaciajn servojn uzeblaj de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio.

Kreskigi inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon por fremdaj popoloj.

## ASOCIACIÓN UNIVERSAL ESPERANTISTA

Oficina Central: 12, Boulevard du Téâtre, Ginebra (Suiza)

*La Asociación Universal Esperantista tiene por* objeto:

Difundir el uso de la lengua internacional auxiliar Esperanto.

Facilitar toda clase de relaciones morales y materiales entre los hombres sin distinción de raza, nacionalidad, religión o lengua.

Crear servicios internacionales para uso de todos los hombres, cuyos intereses intelectuales o materiales traspasan los límites de su nacionalidad o el territorio de su idioma.

Acrecentar entre sus miembros un fuerte lazo de solidaridad y desarrollar entre ellos el conocimiento de los pueblos extranjeros.

La Asocio estas neŭtrala rilate al religio, nacieco aŭ politiko.

*Universala Esperanto-Asocio* konsistas:

El sepmil membroj diverslandaj.

El 1.200 Delegitoj kaj Vicdelegitoj en la ĉefaj lokoj, kiuj respondas la informpetojn de la membroj kaj helpas ilin okaze de vojaĝo.

El Komitato, elektita de la Delegitoj, el Centra Oficejo, el teritoria organizo, ktp.

*Universala Esperanto-Asocio* laboras:

Por konstrui centron de esperantista agado bone ordigita kaj forta. Konsiderante, ke internacia organizo estas necesa al lingvo internacia la lasta kongreso oficialigis U. E. A. kiel la tutmondan organizaĵon de individuaj esperantistoj.

Por faciligi al siaj membroj la praktikan uzon de la lingvo kaj favorigi esperantan korespondadon, turismon, komercajn rilatojn, interŝanĝon de poŝtmarkoj, ktp.

Por konatigi la valoron de nia lingvo ĉe interŝtataj oficejoj, grandaj internaciaj societoj, ktp. La sukceso de tiuj klopodoj multe dependas de la nombro de la personoj en kies nomo la Asocio rajtas paroli.

*Universala Esperanto-Asocio* donas:

Al la Membroj: Membrokarton kaj ducentkvindekpaĝan jarlibron kun la adresoj de la Delegitoj, esperantistaj grupoj, gazetoj, organizaĵoj, kun sciigoj pri internaciaj rilatoj, ktp. Ĉiu membro deziranta korespondi aŭ interŝanĝi rajtas presigi dufoje sian adreson en la gazeto *Esperanto* aŭ speciala aldono.

La Asociación es neutral en asuntos de religión, nacionalidad o política.

*La Asociación Universal Esperantista* consiste:

En siete mil miembros de diversos países.

En 1.200 Delegados y Vicedelegados en las principales localidades, quienes contestan a los informes que les piden los miembros y les ayudan con ocasión de sus viajes.

En un Comité, elegido por los Delegados, en una Oficina Central, en una organización territorial, etc.

*La Asociación Universal Esperantista* trabaja:

Por construir un centro de acción esperantista bien organizado y fuerte. En consideración a que una organización internacional es necesaria a una lengua internacional, el último congreso concedió oficialidad a la U. E. A. considerándola como la organización mundial de los esperantistas individuales.

Para facilitar a sus miembros el uso práctico del idioma y favorecer la correspondencia esperantista, el turismo, las relaciones comerciales, intercambio de sellos, etc.

Para hacer conocer el valor de nuestra lengua en las oficinas entre estados, grandes asociaciones internacionales, etcétera. El éxito de estas gestiones depende en mucho del número de personas en cuyo nombre tenga derecho a hablar la Asociación.

*La Asociación Universal Esperantista* entrega:

A los Miembros: La Carta de socio y un anuario de 250 páginas, con las direcciones de los Delegados, grupos esperantistas, revistas, organizaciones, con noticias sobre relaciones internacionales, etc. Todo miembro que desee corresponder o establecer intercambio, tiene derecho a que se imprima dos veces su dirección en la revista *Esperanto* o especial suplemento.

Al la Membro-Abonantoj: La gazeton *Esperanto*, internacia ĉeforgano de la esperantistoj, kun artikoloj literaturaj, sciencaj, teknikaj kaj precizaj informoj pri la movado.

Al la Membro-Subtenantoj: kun la supraj presaĵoj premion konsistantan el valoraj literaturaĵoj laŭ elekto el la jenaj tri sendaĵoj:

1. Verkaro de D-ro Zamenhof (ok volumoj de tradukoj klasikaj.
2. Internacia Biblioteko Esperanta (32 volumetoj de internacia literaturo; libreto poŝformata).
3. «El Parnaso de popoloj» (poeziaĵoj el tridek lingvoj majstre tradukitaj de Antoni Grabowski).

*Universala Esperanto-Asocio* postulas:

Jaran kotizon de 5 fr. por Membro, de 12'50 fr. por Membro-Abonanto kaj de 25 fr. svisa valoro por Membro-Subtenanto (favorprezo por hispanoj: 6, 15, 30 pesetoj).

A los Miembros-Suscriptores: La revista *Esperanto*, principal órgano internacional de los esperantistas, con artículos literarios, científicos, técnicos y exactos informes sobre el movimiento.

A los Miembros-Protectores: Con los impresos anteriores, un premio consistente en valiosas obras literarias a elección entre las tres remesas siguientes:

1.ª Obras del Dr. Zamenhof (ocho volúmenes de traducciones clásicas).

2.ª Biblioteca Internacional Esperantista (32 pequeños volúmenes de literatura internacional; forma manual de bolsillo).

3.ª «El Parnaso de los Pueblos» (poesías de 30 lenguas, magistralmente traducidas por Antonio Grabowski).

*La Asociación Universal Esperantista* solicita:

Una cuota anual de 5 frs. por Miembro, de 12'50 frs. por Miembro-Suscriptor y de 25 frs. por Miembro-Protector (precio especial para españoles: 6, 15, 30 pesetas, respectivamente).

---

# Gramatiquerías-Gramatikajoj

**Igualdades y diferencias gramaticales : entre el español y el esperanto :**

*Reglas gramaticales. Excepciones.*—En español muchas de las reglas gramaticales tienen alguna excepción.

En esperanto, por el contrario, todas las reglas son de general aplicación.

*Letras mudas.*—En español hay letras mudas o que no se pronuncian, como la —*h*— en todos los casos, y la —*u*— en las combinaciones —*gue—gui—que—qui*—. Así, decimos —*hora—hijo*— etc., sin hacer perceptible el sonido de la —*h*—; y —*guerra—guitarra—quemar—quimera*— sin que se perciba ni suene la —*u*—.

En esperanto todas las letras se pronuncian, cualquiera que sea la combinación en que se empleen.

*Sonido de las letras.*—En español hay letras que tienen dos sonidos distintos y

sonidos iguales que corresponden a letras diferentes. Así, en las palabras —*cacillo— cocer*— la letra —*c*— en las dos primeras sílabas de cada palabra —*ca—co*— suena como —*k*— y en las dos segundas sílabas —*ci—cer*— la —*c*— suena como —*z*—. El mismo sonido se representa en la palabra —*cok*— con dos letras diferentes, con —*c*— al principio y con —*k*— al final. También escribimos indistintamente —*kilometro*— y —*quilometro*— con dos letras diferentes —*k*— y —*q*— para pronunciar del mismo modo. En la palabra —*cezura*— para el mismo sonido empleamos en la primera sílaba la —*c*— y en la segunda la —*z*—. En la palabra —*rara*— escribimos exactamente igual las dos sílabas y, sin embargo, pronunciamos fuerte la primera y suave la segunda. La letra —*g*— tiene también dos sonidos; suave en las combinaciones —*ga—gue gui—go—gu*— y fuerte en las combinaciones —*ge—gi*— en las cuales suena lo mismo que la —*j*—; y decimos —*gamo—guante—guerra—guia—gemelo—giro*— dando dos sonidos a la misma letra. En la palabra —*Gejo*— para el mismo sonido fuerte empleamos dos letras distintas; mientras que en la palabra —*gigante*— empleamos la misma letra —*g*— para los dos sonidos, fuerte y suave.

En esperanto cada letra tiene su sonido único, invariable y diferente del de las otras letras, por lo cual no pueden confundirse unas con otras y conservan siempre su sonido alfabético, cualquiera que sea la combinación en que se empleen. La Ortografía y la pronunciación son, por tanto, rigurosamente fonéticas, no habiendo más que una manera de escribir las palabras bien pronunciadas, y una manera de pronunciar las palabras bien escritas.

*Letras dobles.*—En español existen letras dobles la —*ll*— y la —*rr*— con sonido especial; y así decimos —*calle—perro*—.

En esperanto no hay letras dobles, y cuando se encuentran juntas dos letras iguales en las palabras derivadas o compuestas se pronuncian separadamente, haciendo sentir las dos partes de la palabra, dando en cada una el sonido alfabético de la letra sencilla. Así, —*mallerta*— (torpe) se pronuncia —*mal-ler-ta*—; —*dekkvin*— (quince) se pronuncia —*dek-kvin—littuko*— (sábana) se pronuncia —*lit-tu-ko*—.

*Alfabeto.*—Tienen los alfabetos español y esperanto el mismo número de letras, veintiocho, y de éstas, en ambos, cinco son vocales y veintitrés son consonantes.

Las cinco vocales en ambas lenguas son las mismas —*a—e—i—o—u*— que se nombran, se escriben y se pronuncian exactamente igual.

Las veintitrés consonantes tienen diferente nombre en español y en esperanto y algunas se pronuncian de distinto modo en uno y otro idioma.

En español, el nombre de las consonantes se forma de diferentes maneras: en unas letras, en siete, basta añadir a la consonante la vocal —*e*— y decimos —*be—ce—che —de—ge—pe—te*—; en otras, en ocho, se antepone y se pospone a la consonante la vocal —*e*— y decimos —*efe—ele—elle—eme—ene—eñe—erre—ese*—; y en otras, en ocho, se las designa con nombres especiales no sujetos a regla alguna y decimos —*hache—jota—ka—qu—ve—equis—y griega—zeta.*

En esperanto, el nombre de las consonantes, por considerarle un sustantivo, se

forma añadiendo la vocal *—o—* a cada una de las consonantes; y decimos *—bo—co—ĉo—do—fo—go—ĝo—ho—ĥo—jo—ĵo—ko—lo—mo—no—po—ro—so—ŝo—to—ŭo—vo—zo—*. Se aplica, pues, la regla general de que todo sustantivo termina con la vocal *—o—*.

De las veintitrés consonantes del esperanto, once son en ambas lenguas iguales *—b—d—f—k—l—m—n—p—s—t—v—* y se pronuncian exactamente lo mismo en español y en esperanto. Así, las palabras *—universo—piano—mano—bando—fatalismo—kilolitro—* y otras muchísimas, se escriben y se pronuncian enteramente igual en español y en esperanto, y tienen el mismo significado. Dos consonantes del alfabeto de esperanto, *—g—r—*, tienen siempre el sonido suave de las mismas letras españolas y nunca se pronuncian fuerte como en las palabras españolas *—Gegionense—Gengiskhan—Gema—Gines—Region—Honra—Carro—* y otras muchas análogas.

Cinco consonantes de esperanto *—ĉ—h—ĥ—j—ŭ—* se pronuncian como otras letras españolas distintas: la *—ĉ—* como la *—ch—* española, así *—ĉarlatano—* (charlatán) se pronuncia *—charlatano—*; la *—h—* se pronuncia ligeramente aspirada, como *—j—* suave, así *—horo—* (hora) se pronuncia *—joro—* haciendo muy suave la *—j—*; la *—ĥ—* se pronuncia fuerte, como la *—j—* española, así *—ĥoro—* (coro de iglesia) se pronuncia *—joro—* haciendo fuerte la *—j—* para diferenciarla de *—horo—* (hora) que se pronuncia suave; la *—j—* como *—y—* griega española, así *—jes—* (sí) se pronuncia *—yes—*, *—libroj—* (libros) se pronuncia *—libroy—*; y la *—ŭ—* como la *—u—* vocal española, pero haciéndola breve, de la misma manera que en los diptongos españoles *—au—eu—*, así *—aŭtoro—* (autor) *—eŭropa—* (europeo) se pronuncian haciendo breve la *—u—*.

Las restantes cinco consonantes de esperanto *—c—ĝ—ĵ—ŝ—z—* se pronuncian como combinaciones de distintas letras españolas, o como las letras similares francesas: la *—c—* como *—ts—* españolas, así: *—cent—* (ciento) se pronuncia *—tsent—* y *—placo—* (plaza) se pronuncia *—platso—*; la *—ĝ—* se pronuncia como *—dy—* españolas, o como *—dj—* francesas, así *—ĝardeno—* (jardín) se pronuncia *—dyardeno—*; la *—ĵ—* como *—ych—* españolas, haciendo suave la *—ch—*, o como la *—j—* francesa, así *—ĵurnalo—* (periódico) se pronuncia *—ychurnalo—*; la *—ŝ—* como la *—ch—* francesa en la palabra *—chat—* (gato), apoyando el extremo de la lengua en el paladar y dejando escapar el aire con fuerza, así *—ŝalupo—* (chalupa) se pronuncia *—chalupo—* haciendo la *—ch—* francesa; la *—z—* como *—ds—* españolas, o como la *—z—* francesa, así *—zuavo—* (zuavo) se pronuncia *—dsuavo—*.

En el alfabeto de esperanto faltan las letras *—ll—ñ—q—x—* españolas, las cuales, al traducirse al esperanto, se sustituyen, la *—ll—* por *—lj—* así: (Sevilla) se traduce *—Seviljo—* (Valladolid) *—Valjadolido—*; la *—ñ—* por *—nj—* así (Logroño, Coñac) se traducen *—Logronjo—Konjako—*; la *—q—* se sustituye por *—k—*, así (quilometro) se traduce *—kilometro—*; y la *—x—* se traduce por *—ks—* así (exportar) se traduce *—eksporti—*.

Madrid, 29 noviembre, 1924. BENIGNO DE LUNA.

TIPOGRAFIA MODERNA, A C. DE M. GIMENO, PRIMADO REIG (antes Avellanas, 11, VALENCIA